Jarraporto de la Komisiono pri Laboro kun Bibliotekoj

La 2-an de julio 2007

Membroj: David Koch, Boris Kolker, David Pardue

La Komisiono pri Laboro kun Bibliotekoj (KLB) konsistas el tri personoj: Boris Kolker (gvidanto), David Pardue (ĉefa kunlaboranto) kaj David Koch (kunlaboranto). La KLB klopodas efektivigi ideon proponitan de Boris Kolker: konvinki bibliotekojn aĉeti Esperantajn librojn de la Libroservo de ELNA el malgranda, zorge kompilita listo.

Ĉi-jare KLB malaktivis. Venontjare ni intencas plenumi la taskojn nefinitajn.

Resumo de nia laboro antaŭa

Ni elektis cent bibliotekojn kontaktindajn el la aktuala adresaro de la American Library Association [Asocio de Bibliotekoj Usonaj] kaj trovis la adresojn kaj nomojn de multaj oficistoj laborantaj ĉe tiuj bibliotekoj. Ni registris tiujn informojn en sterntabelon kaj konservis ilin laŭ diversaj formatoj (Excel, OpenOffice.org, AppleWorks).

Taskoj ankoraŭ farendaj

- Verkado de letero (prefere ne pli ol unupaĝa) por konvinki bibliotekistojn aĉeti varojn de ELNA. Ni petos al aliaj bibliotekistoj, kiuj membriĝas en ELNA (ekz-e, Pam Lieber, Jay Shorten), ke ankaŭ ili partoprenu la verkadon de nia reklamletero.

- Kompilado de listo de aĉetindaj libroj, proks. 10–15 titoloj.

Raportis David Pardue.